

sub la suda kruco ★  
decembro 2015

# ESPERANTO





# ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 23 [4] numero 121 decembro 2015

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio  
Redaktoroj: David Ryan, Joanne Johns  
Kontaktadreso | [esk2@esperanto.org.au](mailto:esk2@esperanto.org.au)

AEA - ESK  
G.P.O. Box 2122  
Melbourne, Victoria 3001  
Australia

## Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | [www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au) – [info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)  
NZEa | [www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz) – [exec@esperanto.org.nz](mailto:exec@esperanto.org.nz)

## Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, [esk2@esperanto.org.au](mailto:esk2@esperanto.org.au)

**Limdato por kontribuoj por la sekva numero**

**15-a de februaro 2015**

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

**Por la opinioj aperantaj  
en ĉi eldonajo respondecas la aŭtoroj.  
Ili ne necese spegulas la opiniojn  
aŭ de AEA aŭ de NZEA.**

Copyright © 2015 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj  
ISSN 1038-9380.

**SUR LA KOVRILO:** Zamenhof forte deziras ke vi festu la datrevenon de sia naskiĝtago! Detaloj pri lokaj festoj estas sur paĝo 9



5.

Ĉu niaj rolmodeloj estu  
veraj homoj aŭ fikciuloj?



6.

*Konvinka Kamuflaĵo*: konvinke  
leginda libro



7.

“Kia estos nia estonteco?”



10.

Antaŭ-, dum-, kaj  
post-kongresaj ekskursoj




13.

Halo! Saluton!




14.

*La urbo ĉe Ranceby*: recenzo



16.

Miaj travivaĵoj en Aŭstralio



18.

Evildea respondas



21.

Teatraĵo pri Esperanto-TV



27.

Esperantaj poŝtkartoj

decembro, du mil dekkvin

# Antaŭparolo

DAVID RYAN (WELLINGTON)

Venis amaso da homoj: lernejanoj, oficistoj, policistoj, senlaboruloj, instruistoj, soldatoj, studentoj, plumbistoj. Antaŭ la Parlamentejo de Nov-Zelando, ili staris tie atendantaj senpacience ion tre gravan. Estis tre varma tago en la nov-zelanda ĉefurbo. Pro tio, miloj amasiĝis antaŭ la Parlamentejo kaj en la apudaj stratoj. Eĉ pasaĝeroj en aviadiloj kiuj flugis super Wellington facile vidis la suban amason.

Kial ili ne estis ĉe la lernejo aŭ laborejo? Kion ili faris tie? Ĉu revolucio? Ĉu novaĵo pri nova flago? Ĉu protesto kontraŭ terorismo? Kial venis tiom da infanoj, virinoj, maljunuloj, viroj, kaj hundoj?

Subite antaŭ la amaso aperis eta

grupo de gravaj homoj. Ĉiuj kriis samtempe laŭtvoĉe. Kiuj estis tiuj homoj? Ĉu politikistoj? Ĉu mondfamaj kantistoj aŭ aktoroj? Ĉu novaj dioj el la ĉielo?

Ĉiuj subite silentiĝis. Ili volis aŭdi la vortojn de tiuj gravuloj. Kaj subite, granda paniko. Tiuj gravaj homoj komencis moviĝi. Oni nepre devis sekvi ilin, alproksimiĝi al ili, tuŝi ilin, ne perdi la vidon de ili.

Sed, kio okazis en tiu bela novembra tago? Kial tiel granda amaso da nov-zelandanoj en la sama loko je la sama horo? Kial temis pri io grava ne nur por Nov-Zelando sed ankaŭ por Aŭstralio?

Vidu la lastan paĝon por tie malkovri la respondon al ĉi tiu mistero.



# Ĉu niaj rolmodeloj estu veraj homoj aŭ fikciuloj?

ESPERANTO-RONDO DE WELLINGTON

---

Kiuj estas aŭ devas esti niaj rolmodeloj? Dum kunveno de la Esperanto-Rondo de Wellington ni parolis pri ĉi tiu temo.

Do, kiu aŭ kio estas rolmodelo? Estas persono kiu havas influon sur ni kaj al kiu ni volas simili ĉar tiu persono havas bonajn trajtojn kiuj plaĉas al ni. Eble ili estas tre fortaj, tre lertaj, aŭ tre sukcesaj, kiel ekzemple ĉefministro aŭ sportisto kiu gajnas medalon en Olimpiaj Ludoj.

Tamen, kelkfoje tiuj personoj, malgraŭ siaj fortecoj kaj sukcesoj, havas malbonajn trajtojn. Ekzemple, kelkaj sukcesaj sportistoj en Nov-Zelando estas drinkemaj aŭ perforte atakas sian edzinon. Ĉu tiu persono estas bona rolmodelo? Ne. Pro tio, estas malfacile kredi ke veraj homoj povas esti perfektaj. Ĉiuj el ni havas kaŝitan sekreton, ĉu ne?

Multaj homoj iam admiris Hitleron pro la fakto ke li estis, almenaŭ je la komenco, lerta milita strategiisto kaj pasia oratoro. Li facile konvinkis milionojn da homoj. Tamen, poste li preskaŭ detruis la mondon. Dum pluraj jaroj, li estis rolmodelo por multaj germanoj de tiu epoko sed, fakte, li estis diable malica homo.

Unu el niaj membroj menciis malnovan kanton “Biko” de Peter Gabriel pri sudafrikano, Steve Biko.

Ŝi demandis al sia patro kiu estas Steve Biko kaj la patro respondis ke li estas teroristo. Poste ŝi demandis al sia patrino kiu respondis ke Biko estas batalanto por libereco kaj egaleco. Strange, ĉu? Ne vere. Ĉiu havas propran opinion.

Kelkfoje estas pli facile inventi rolmodelojn. Ni legas librojn pri inventitaj herooj. Oni scias nur ke ili estas perfektaj. Oni ne legas pri ties malbonaj trajtoj, ĉar neniu verkas libron pri malbonaj herooj. Fikciuloj estas perfektaj kaj junaj knaboj ofte diras, ekzemple ‘kiam mi pligrandiĝos mi volas esti kiel Superhomo’. Imagu precipe se junaj geknaboj konas nur malbonulojn (pensu pri familio kie la patro estas membro de kontraŭleĝa motorcikla grupo). Kompreneble tiuj geknaboj ne trovos taŭgan rolmodelon en la familio aŭ amikaro. Ili volos scii pri fikciaj, bonulaj herooj.

Finfine, je la fino de nia diskuto, ni surpiziĝis ke neniu menciis ke ‘miaj gepatroj estas miaj rolmodeloj’. Laŭ ni, gepatroj ĝenerale estas influaj rolmodeloj, sed ŝajnas ke aliaj homoj havas pli fortan influon. Ĉu eble pro la fakto ke gepatroj, kiuj estas veraj homoj, laŭdifine ne povas esti perfektaj?

# Konvinka Kamuflaĵo: konvinke leginda libro

DAVID RYAN (WELLINGTON)

*Konvinka Kamuflaĵo* estas aŭtobiografio de la fame konata aŭstralia verkisto, Trevor Steele. Multaj homoj erare pensas ke la libro estas romano pri iu inventita homo. Tamen, ne. Kvankam la libro plenas je internaciaj aventuroj, intrigoj, kaj amoj en ekzotaj landoj (kelkfoje ŝajnas ke la libro temas pri James Bond), la libro fakte temas pri normala aŭstralia homo kiu, hazarde, estas unu el la elstaraj verkistoj de nia Esperanta literaturo.

Preskaŭ ĉiuj legantoj de *Esperanto sub la Suda Kruco* jam konas Trevor ĉar li ofte instruas dum somerkursaroj kaj kongresoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Tamen, ne ĉiuj bone scias pri lia pasinteco. *Konvinka Kamuflaĵo* temas pri la vivo de Trevor ekde lia naskiĝo en Kvinslando ĝis lia nun pli trankvila vivo en Adelajdo kun Katja, la 'forta bastiono' de lia vivo. Trevor emfazas ke *Konvinka Kamuflaĵo* estas nur provizora raporto de sia vivo, kiu certe ne estas (ni esperas) tuj ĉesonta.

Kiel knabo, Trevor loĝis unue en tendo apud rivereto en arbaro de Kvinslando. En la lernejo, Trevor



estis lerta, studema lernanto. Li decidis eniri seminarion en Brisbano, kiun li forlasis post tri jaroj, ne plu volante esti pastro. Tamen, dank'al la seminaria biblioteko li ektrovis amon por la germana lingvo. Ekde tiam, komenciĝis kariero kiel instruisto de la germana, angla por eksterlandanoj, kaj ankaŭ Esperanto, kaj ankaŭ kiel tradukisto

kaj verkisto. Dank'al tiu kariero de instruisto kaj lingva scio, Trevor sukcesis koni la mondon, kaj multaj ĉapitroj en *Konvinka Kamuflaĵo* temas pri eksterlandaj spertoj de Trevor, plej parte en Eŭropo kie certe ne mankis amikinoj (jes, estas interesaj anekdotoj kaj eĉ fotoj de belaj fraŭlinoj).

En *Konvinka Kamuflaĵo* Trevor rakontas al ni diversajn aspektojn de sia tre interesa vivo, ekzemple:

- restadoj en Bona Espero, bieno en preskaŭ senhoma region en centra Brazilo
- laboro kiel prizorganto de domo en Germanio por multfojaj krimintoj, senesperaj kazoj, kaj senŝtatuloj
- mallonga kariero kiel diplomato ĉe la ambasado de Aŭstralio en



Germanio

- posteno kiel Ĝenerala Direktoro de la Universala Esperanto-Asocio en Roterdamo

- edziĝo kun unua edzino, naskiĝo de filo, kaj posta eksedziĝo

- instruado de Esperanto en diversaj landoj, ekzemple Litovio, eksa Sovetunio, Honkongo ktp.

*Konvinka Kamuflaĵo* estas facile legebla. La libro estas ne nur aŭtobiografio de Trevor sed ankaŭ donas multajn interesajn kaj historiajn perspektivojn pri tradicia vivo de granda familio en kampara vilaĝo en Kvinslando, Eŭropo antaŭ kaj post la

falo de la muro de Berlino, krizo en Sovetunio je la fino de la komunista epoko, kaj la vivo de aborigenoj en la Norda Teritorio.

Fine, de kie venas la titolo de la libro? Trevor demandas sin ĉu eble la ŝajne solida materia mondo estas ‘kamuflaĵo’ de pli profunda realaĵo, iom simila al la koncepto de ‘Maya’ (iluzio).

Se vi trovis ĉi tiun recenzon interesa, vi povos tuj akiri *Konvinka Kamuflaĵo* ĉe [www.esperanto.be/fel/but](http://www.esperanto.be/fel/but) (11,50 eŭroj por elektronika libro).

## “Kia estos nia estonteco?”

MARCEL LEERVELD (MELBURNO)

La Velingtona Esperanto-Rondo deziras scii, kion ni pensas pri la estonteco de Esperanto. Antaŭ ol respondi al ilia artikolo, mi deziras rakonti alispecan sperton pri kio povas decidi pri nia estonteco.

Kiam mi estis junulo, kaj jam fluparolanta Esperantisto, mi havis francan amikon, kun edzino, ambaŭ kelkajn jarojn pli aĝaj ol mi kaj fluaj en Esperanto. Li jam havis bone pagatan okupon, ĉar li estis tre inteligenta. Li ankaŭ estis marksisto, kiel mi. Lia laboro konsistis



Marcel je dek ok jaroj

en konsilado al grandaj komercaj kompanioj kiel eviti aŭ malpliigi la meritatan ŝtatan imposton. ĉar li estis tiom valora al la kompanioj, li enspezis altajn salajrojn. Ni sufiĉe ofte renkontiĝis, ĉar li kaj la edzino povis facile permesi al si vojaĝi el Parizo al Amsterdamo per vagonaro, dum mi regule vizitis Parizon, plej ofte per biciklo ja pli malmultekosta por la 500 km ire kaj 500 km retroe. Antaŭ ol mi

ekkonis mian amikon, kiel infano kaj poste kiel junulo, mi neniam ŝtelis; tio ne estis kutimo en mia familio. Sed mia franca amiko opiniis, ke ŝtelo

estas morale bona, ĉar la kapitalistoj, kiujn li helpis, nature devas, pro la komerca konkurado, ŝteladi el la registaro, do el la popolo. Li estis tre sperta ankaŭ en ŝtelado, precipe de karaj libroj, kaj neniam kaptatis. Do li instruis al mi kiel ŝteli librojn, precipe multekostajn artverkojn. Komence mi ne ŝatis tion, sed pro ripetado ankaŭ mi lernis tiun "arton". Sed post nur kelkaj jaroj mia konscienco bonŝance ekaktiviĝis, kaj mi definitive ĉesigis la ŝteladon, parte pro simpatio al la elŝtelitoj. Mi komencis honti pri miaj agoj, kaj nun plu hontas pro tiuj miaj faroj de antaŭ okdeko da jaroj, same kiel mi, verŝajne kiel ĉiuj homoj, plu hontas kaj koleras pri mi mem pro la kvino da miaj mistraktoj ante aliajn personojn dum mia vivo. Sed kion mi ankaŭ lernis el tiu ŝtelado estas, ke tre malfacilas ĉesigi kutimon. Tial mi jam juna rifuzis komenci la kutimojn de fumado, de te- kaj kafotrinkado, de drinkado kaj eĉ de modesta vinaŭ bierado. Cetere mia franca amiko marksista post kelkaj jaroj forlasis siajn edzinon kaj infaneton, edziĝis al la filino de unu el la direktoroj de Fiat en Italujo, kaj poste mem fariĝis direktoro.

La supra enkonduko celas substreki mian timon, ke pro jamaj kaj pluaj alkutimiĝoj al esceptoj kaj al malregulaĵoj gramatikaj kaj al multegaj nenecesaj neologismoj Esperanto kiel tia degeneros al lingvo simila al la etnaj lingvoj kun siaj multaj esceptoj kaj mallogikaĵoj gramatikaj kaj neregula literumado. Mi ne samopinias kun Kalocsay kaj Waringhien kaj multaj

ESK | paĝo 8 | 121 | decembro 2015

Esperantistoj, ke kelkaj esceptoj jen kaj jen ne gravas. Tuj kiam oni permesas esceptojn kaj mallogikaĵojn kaj nenecesajn neologismojn, tio fariĝas permesata kutimo kiun ekstermi estas ege malfacila. La afero ne gravus se la Esperantistoj dezirus ke Esperanto fariĝu same malfacile lernebla kaj same nefidebla kiel la antaj kaj ontaj etnaj lingvoj internaciaj, speciale la angla kaj la ĉina. Sed la Esperantistoj bonŝance ne deziras tion, kvankam ili faras nenion por kontraŭi tiun tendencon. La danĝero do estas, ke oni alkutimiĝas al la jama tendenco akcepti esceptojn, mallogikaĵojn, kaj nenecesajn neologismojn. Tiu tendenco restos, ĉar ne ekzistas kompetenta institucio kiu tuj ekzamenas kaj tuj klarigas al la Esperantistaro tiujn evitindaĵojn, tuj kiam ili aperas. Oni ja devas malhelpi krimon tuj ĉe la komenco. Pro la manko de institucio de kompetentaj Esperantologoj mi timas, ke nia lingvo degeneros al neutila ekstra lingvo komplika simila al la etnaj lingvoj.

Se mi estus pli juna, mi starigus, kun la nur kelkaj samideanoj timantaj la saman degeneron, organizon de Esperantologoj kiuj kompetente tuj konsilus al la Esperantistaro kio estas evitinda en la lingvo kaj kiuj scias ke Esperanto devos resti artefarita por resti utila kaj facila kaj fidebla internacia lingvo por funkcii kiel fidinda interkomunikilo inter homoj parolantaj malsamajn lingvojn.



# ZAMENHOFAJ FESTOJ 2015

Helpu nin celebri la datrevenon de la naskiĝtago de la kreinto de Esperanto, L. L. Zamenhof! Estos festoj ĉirkaŭ Aŭstralio kaj Nov-Zelando. Jen la detaloj:

## KVINSLANDO

**Kie:** Queens Park, Ipswich

**Kiam:** 10.30atm, 19-a de decembro

**Kio:** Pikniko.

## NOVSUDKIMRUJO

**Kie:** Esperanto House, 143 Lawson Street, Redfern

**Kiam:** 12:00ptm - 4:00ptm, 13-a de decembro

**Kio:** Provizita tagmanĝo, prezentaĵoj, videoj de Esperanto-TV, kantoj kaj babilado.

## VIKTORIO

**Kie:** Unitarian Peace Memorial Church, 110 Grey Street, East Melbourne

**Kiam:** 6.30ptm (aŭ 4.30ptm por ĉeesti la jarkunvenon de AEA), 12-a de decembro

**Kio:** AEA-jarkunveno (per Skajpo), muziko, prelegoj, poezio, teatraĵoj kaj aliaj distraĵoj. Alportu manĝaĵon por kundividi ĉe nia bongustega bankedo.

## SUDAŬSTRALIO

**Kie:** Ĉe Indrani (pli da informo havebla



ĉe Indrani\_BL@hotmail.com aŭ (08) 8285 3128

**Kiam:** 4.00ptm, 12-a de decembro

**Kio:** AEA-jarkunveno (per Skajpo), prezentoj de membroj, kuna fest-manĝaĵo/trinkaĵo, kantado kun Bob (mandolino) kaj Indrani (piano)

## WELLINGTON, NOV-ZELANDO

**Kie:** Restoracio China City, 11 Main St, Upper Hutt

**Kiam:** 6.30ptm, 2-a de decembro

**Kio:** Festo, ĉina bankedo.



**TRILANDA KONGRESO  
DE ESPERANTO KAJ  
SOMERKURSO**

# ANTAŬ-, DUM-, KAJ POST-KONGRESAJ EKSKURSOJ

## ANTAŬKONGRESA EKSKURSO

Insulo de Pari (Kepulauan Seribu),  
Ciwidey, Bandung

**Kiam:** Dimanĉo, 2016-03-20 (6.00atm)  
ĝis merkredo 2016-03-23

**Kotizo:** 300 AUD / 200 EUR

**Gruplimoj:** minimume 20

**La kotizo inkluzivas:**

loĝado / veturkostoj / manĝaĵoj /  
enirbiletoj por vizitindaj lokoj /  
trinkakvo

**Limdato por aliĝi:** 2016-02-29

Ĝuu belajn pejzaĝojn en pluraj lokoj!  
Partoprenante la antaŭkongresan  
ekskurson, vi vizitos Kepulauan  
Seribu, insulojn norde de la ĉefurbo,  
Ĝakarto. Tie vi povos ĝui la plaĝon  
kaj belan naturon en tropika vetero.  
Por ĝui la geografian diversecon,  
post Kepulauan Seribu vi vizitos

Ciwidey kiu troviĝas en sufiĉe  
alta loko en Bandung, kie vi  
povos ĝui krateron, lagon, kaj  
teplantadon kun malvarma  
vetero. Antaŭ ol iri al la

kongresejo, en Bandung vi vizitos  
Dago Pakar, alinome Taman Hutan  
Raya Ir. H. Djuanda, kie multaj plantoj  
kreskas kaj troveblas kavernoj kun tre  
freŝa aero. Post la ripozo for de via  
kutima vivo, vi certe jam pretos ĝoje  
kongresumi. Tiel ni rekte kunveturos  
al kongresejo.



*Foto: Jorge Láscar*

## DUMKONGRESA EKSKURSO

Saung Angklung Udjo, Muzeo, Bukit  
Moko

**Kiam:** Sabato, 2016-03-26

**Kotizo:** pluaj informoj en januaro  
2016

**Gruplimoj:** minimume 50

**Limdato por aliĝi:** 2016-02-29

**ALIĜU KIEL EBLE PLEJ FRUE ĈE:**

**ica@esperanto.or.id aŭ ilia.dewi@gmail.com**

Ĉu vi volas ĝui la etoson de la Sunda kulturo? En la dumkongresa ekskurso vi vizitos Saung Angklung Udjo kie vi povos spekti kulturajn spektaklojn, nome Wayang kaj Angklung, kaj ankaŭ tradician dancon. Tie ankaŭ eblos ĉeesti prelegojn pri Angklunga kaj Sunda kulturoj. Ĉu tio ne sufiĉas? Ni tie tagmanĝos, kaj ni manĝos tipajn Sundajn manĝaĵojn. Vespere ni vizitos Bukit Moko, monteton tuj post Saung Angklung Udjo, de kie vi povos ĝui la pejzaĝon de Bandung, kiu belas precipe nokte. Jen neforgeseblaj spertoj en Bandung!



*Foto: Inna Dee*

## POSTKONGRESA EKSURSO

Dieng kaj Jogjakarta

**Kiam:** Lunde, 2016-03-28 ĝis lunde 2016-04-04

**Kotizo:** 650 AUD / 435 EUR

**Gruplimoj:** minimume 10

**La kotizo inkluzivas:**

loĝado/busveturado/manĝaĵoj/  
enirbiletoj por vizitindaj lokoj/  
ĉiĉeronado

**La kotizo ekskluzivas:** flugbileto al  
Jogjakarta

**Limdato por aliĝi :** 2016-02-29

Ĉu vi bezonas pli da indoneziaĵoj? Jen la plej taŭga ekskurso. Ok tagoj en Dieng kaj Jogjakarta certe kontentigos vin. Ekde vizito al pluraj krateroj kaj kavernoj en Dieng, ĝuado de sunleviĝo kaj sunsubiro en pluraj lokoj, spertu kulturajn aferojn, eĉ tendumi ĉe tre bela plaĝo. Ĉi tiu ekskurso estos plena je interesaj kaj nekutimaj spertoj.



*Foto: Anandajoti Bhikkhu*



*Foto: Fauzan Alfi*

**Roger SPRINGER***Manlio, Novsudkimrujo***Kion vi ŝatas pri via loĝloko?**

Ĉi estas la plej bona loko en la mondo.

**Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?**

Instruisto.

**Kio nuntempe estas plej grava en via vivo?**

Esti kontenta.

**En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro se vi havus la ŝancon?**

Ĉinio.

**Kiel junulo, kiun vi admiris?**

Min mem.

**Nicole ELSE***Sidnejo, Novsudkimrujo***Kion vi ŝatas pri via loĝloko?**

Ĉi estas sekura loko, ne apud vulkano.

**Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?**

Instruistino.

**En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro se vi havus la ŝancon?**

Mi deziras daŭre vivi en Aŭstralia, sed mi ŝatus ke Eŭropo estu nur unu horon for per trajno por povi oftigi veturi tien por unu tago.

**Kio plej timigas vin en la nuna mondo?**

Malsanoj, akcidentoj, aferoj kiuj povas mortigi vin.

**Kiel junulo, kiun vi admiris?**

Mian avinon.

**KIPPIE***Koala Lumpur, Koalalando***Kion vi ŝatas pri via loĝloko?**

Mi povas dormi pace en arbaro dum la tuta tago.

**Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?**

Bestkuracisto.

**En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro se vi havus la ŝancon?**

Mi ŝatus iri al Aŭstralio por viziti miajn gefratojn, geonklojn, gekuzojn ktp.

**Kio plej timigas vin en la nuna mondo?**

Se oni forigas mian arbaron por fari meblojn ktp, tiam mi ne havos arbon kie loĝi.

**Kiel junulo, kiun vi admiris?**

Steve Irwin, ĉar li konstruis sekuran loĝlokon por koaloj (Australia Zoo).



# Halo! Saluton!

QONITA QURROTA'AYUN (INDONEZIO)

---

Halo...!!

Nama saya Qonita Qurrota'ayun tetapi bisa di panggil Nita. Saat ini saya sebagai Presiden Esperanto Bandung. Saya mengenal Esperanto pada akhir 2013 waktu itu ketika saya berumur 18 tahun. Awalnya saya kira Esperanto adalah bahasa dari Negara Spanyol, tetapi ternyata bukan. Sedikit demi sedikit saya mencari tahu apa itu Esperanto, walau hanya mengandalkan internet. Belajar Esperanto sangat menyenangkan dan cukup mudah. Sayangnya, saya jarang berlatih. Saya harus belajar Esperanto lebih banyak. Apalagi saya sekarang menjadi Presiden Esperanto Bandung. Pengalaman pertama saya pula menjadi ketua tingkat lokal untuk kongres Esperanto tahun 2016. Tidak hanya itu semakin hari saya semakin banyak memiliki teman dari berbagai negara. Ilmu saya pun menjadi bertambah. Saya berharap suatu saat nanti mengikuti kongres Esperanto di berbagai negara agar dapat bertemu dan berinteraksi dengan pengguna esperanto dari berbagai negara. Saya selalu mencoba agar esperanto di kenal lebih banyak orang di Indonesia, khususnya di Bandung.



Saluton!!


Mia nomo estas Qonita Qurrota'ayun sed oni povas nomi min Nita. Mi estas Prezidanto de la Esperanto-klubo en Bandung. Mi ekkonis Esperanton en 2013 kiam mi estis 18-jaraĝa. Antaŭ tiam, mi pensis ke Esperanto estas lingvo el Hispanio, sed fakte ne. Do, mi komencis lerni Esperanton per la interreto. Malbonŝance, mi malofte praktikas la lingvon. Tial, mi devas diligente lerni Esperanton. Cetere, mi estas nun la Prezidanto de la Esperanto-klubo en Bandung. Estas la unua fojo kaj mia unua sperto estas labori kiel Prezidanto de la loka komitato por la venonta kongreso en Bandung en 2016. Krome, mi nun konatiĝis kun tiom multe da novaj amikoj el aliaj landoj kiuj ankaŭ lernas Esperanton. Mi esperas ke mia kapablo pliboniĝos. Mi esperas ke iun tagon mi povos partopreni

internaciajn kongresojn de Esperanto kaj sperti ŝancon de renkontiĝo por interagi kun parolantoj de Esperanto el diversaj landoj. Mi ĉiam provas enkonduki Esperanto al pli da homoj en Indonezio por ke ili ekkonatiĝu, speciale en Bandung-urbo.

# La urbo ĉe Ranceby: recenzo

TRISTAN McLEAY (MELBURNO)

*Ĉi tiu verko ne estas recenzo de vera libro, sed apartenas al la kategorio de “fikcia eseo”. Do simile la bildo povas esti konsiderata kiel “fikcia foto”.*



La historioj de la urbetoj kaj urberoj de Aŭstralio ne estas bone konataj, komprenataj, eĉ sciataj, plej parte ĉar la ne-aŭstraliano ne interesigas sin pri Aŭstralio krom la klimato, kaj aŭstraliano ne interesigas sin pri Aŭstralio krom la vetero.

Malmultajn librojn ja skribis eĉ pli malmultaj verkistoj, ofte ne historiistoj. Ĉiu skribas pri siaj propraj urberoj, kaj ĉi tiujn verkojn aĉetas nur unu aŭ du loĝantoj de la loko, kiuj tuj metas ĝin sur breton nelegitan kaj baldaŭ forgesitan. Kaj kompreneble, ĉiuj estas samaj. «La tramo aŭ la fervojo venis tiam, kaj iris ĉi tiam. La neforgesebla bela konstruaĵo estas nun la malbela

biblioteko forgesinda». Se oni estas bonŝancema, ĝi havas anekdotojn neinterligitajn kaj oni eble—eble—komencas scii kiuj loĝis tie iomete pli frue.

Sed malsamas la verko kiun mi recenzas ĉi tie.

Miaj gepatroj antaŭnelonge transloĝiĝis el la malproksimaj sudorientaj urberoj de Melburno al farmobieno ekster Korumburra en Suda Gippslando, en loko nomita Ranceby. Nuntempe Ranceby estas nur farmobienoj kun halto ĉe la kruciĝo de la vojoj Warragul–Korumburra kaj Poowong–Ranceby. Ranceby estas tro proksima al Korumburra por kredi ke Ranceby povis esti memstara aŭ urba. Tamen, dum 13 jaroj, ekde 1830 ĝis 1843, multan tempon antaŭ la fondo de Korumburra, lokis tie urbeto de ĝis tridek konstruaĵoj kaj ĝis cent uloj kiuj plej parte memregis sian urbeton «kiel sendependan insulnacion».

Nenia urba spuro postrestas ĝis nun, kaj—precize kaŭze de ties memstaro—ĝi estas preskaŭ tute forgesita. La Historia Societo de Korumburra havas nur unu mallongan aludon al la urbeto: «Kontraŭleĝaj setlejoj oftis en Viktorio dum la frua kolonia periodo; estis eĉ urbeto ĉe Ranceby dum la fondo de Melburno. Bedaŭrinde ĝia nomo ne sciatas.»

Siatempo la urbo temis plejparte pri

terkulturado, sed ĝi subtenis ankaŭ vendejon kaj metodistan predikiston kiu iel gvidis la urbon. Ili estis vegetaranoj, verŝajne sur krista vegetara (iel pacisma) bazo kaj por praktikaj kialoj. Ŝajnas ke la lokanoj plejparte manĝadis nur tion kion ili kultivis kaj ne ekpensis manĝi la aŭstraliajn plantojn. La vendejo nur vendis tion kio kreskas aŭ fariĝas en la urbo. Tial, oni konkludas ke ĉiu farmbieno specialiĝis en unu aŭ kelkaj produktoj.

Ilia sendependeco igis sian ruinon, kiel sian forgesiĝon. Ili ne interrilatis tiel kun la eta setlejo iĝonta Melburno, kiel kun la ĉirkaŭantaj praaŭstralianoj. Ofte la praaŭstralianoj alvenis, hieraŭ helponte, morgaŭ helpote. Tiom ofte la setlantoj sklavigis aŭ mortigis ilin. La perforto detruis la urbanojn el interne. Unue la urbo freneziĝis kaj la urbanoj ĉesis interrilati inter si mem; poste, la uloj mortis aŭ vivis kiel mortintoj, ne parolantaj, ne kunlaborantaj, ne ŝanĝantaj, nenion farantaj. La finajn urbulojn trovis Charlie, la gvidanto de la ekspedicio tra Gippslando de Paŭlo Strzelecki. Strzelecki, kiu ne vidis ilin, skribis iomete:

*Sur la kresto estas eta perdinta aro de perdiĝontoj homoj, venintaj el Van Diemens Land. Ili havas la mortajn okulojn de tiuj kiuj faris tro multe. Banks sciolas ĉu ni trovas la vojon en la arbaro al la infero. Mi esperas ke iliaj krimoj meritas iliajn punojn.*

*The City at Ranceby* (1994) de Libby Yezhova (234 paĝoj, Melburno: La Trobe University Press) ŝajnas pli kiel tasmania-gotika romano ol la doktora disertacio sur kiu ĝi baziĝas (*The City at*

*Ranceby: A Psychological History*, 1993. Bendigo: La Trobe University). La verko senbilda ilustritas bele per anekdotojigitaj kune en la malĝojan rakonton de urbo frenezigita per la volanta, obstina izolado de la enloĝantoj. La verko baziĝas plejparte sur la verkoj de Strzelecki, gazetartikoloj kaj mortatestiloj el la meza dek-naŭa jarcento, sed ankaŭ sur la arĥeologia esploro de John James, arĥeologo dum la malfrua 19-a jarcento ĉe la Universitato de Tasmanio.

La libro estas ne plu presita, kaj la retejo de Yezhova nur alireblas per interreta arĥivo. Bedaŭrinde ri ŝajne mortiĝis nelonge post la eldono de lia libro. La kopion legatan de mi, trovis mia patrino en ŝranko en la malnova laktejo. Tamen, se oni sukcesas trovi alian, la libro estas tre leginda.

Mi finas, kiel Yezhova, kun ĉerpaĵo el la respondo de la estro de la metodistoj en Tasmanio, kiam ri petitis funebri la predikiston de la urbo ĉe Ranceby:

*Kaj parolas ci pri iu nekrista abonemaĵo! Sklaviginto, mortiginto, trompinto de infanoj.*

*Ri bruladas en la fajraj profundoj de l'infero. Neniu rin funebros.*

---

**Rimarko de la redaktoro:** Kiam mi kontrolis ĉi tiun artikolon mi ne komprenis kial Tristan kelkfoje uzas 'ri'. Ŝajnis ke li faris tajperaron. Poste mi iom esploris kaj mi eltrovis ke 'ri' estas proponita lingva reformo por forigi seksan diskriminacion (anstataŭ 'li' aŭ 'ŝi'). Vidu [https://eo.wikipedia.org/wiki/Proponitaj\\_reformoj\\_de\\_Esperanto](https://eo.wikipedia.org/wiki/Proponitaj_reformoj_de_Esperanto). Kion vi opinias pri tio?



# Miaj travivaĵoj en Aŭstralio

ILIA DEWI (INDONEZIO)



Ilia gvidas dancadon dum la indonezia vespero

De la 2-a ĝis la 11-a de januaro 2015 mi partoprenis E-kongreson en Aŭstralio – ja mia unua vojaĝo al tiu lando, unue al Sidnejo kaj poste al Melburno, kie okazis la kongreso. Dum preskaŭ dek tagoj, ĉirkaŭ 50 partoprenantoj el diversaj partoj de Aŭstralio, Nov-Zelando, kaj aliaj landoj interkonatiĝis, amikiĝis kaj kune laboris kaj ĝuis la etoson. Mi ricevis du taskojn: instrui la komencantojn kaj kontribui al la programero “Indonezia vespero” – kulturaj prelegoj, tradiciaj dancoj, kantoj, manĝaĵoj, kaj lingvo. Tiu vespero restas kiel bela memoraĵo ĉar ŝajnas al mi ke tiu duhora prezentado plaĉis al ĉiuj.

Mi jam partoprenis Esperantajn eventojn en aliaj landoj. Tamen, mi havis specialan impreson pri la aŭstralia kongreso. Unue, la riĉenhava programo kun interesa prelegaro bone atingis sian celon roli kiel interŝanĝo de informoj, ideoj, kaj opinioj inter partoprenantoj. Gravas reliefigi ke la prelegantoj estis sufiĉe preparitaj kaj bone faris sian laboron. Pro tio preskaŭ en ĉiu prelego okazis malteda interkomunikado kaj diskutado.

Plej plaĉis al mi la prelegoj pri projekto de Esperanta film-industrio, reta kurso de Esperanto en Duolingo, kaj ekologio de Melburno. Grava programero estis somera kurso, ĉar

kuniĝo de kongreso kaj Esperanto-kurso certe estis avantaĝa por lernantoj kiuj povis uzi la tempon por kaj lerni kaj poste praktiki kun aliaj kongresanoj.

Due, mi konstatis ke ĝenerale la aranĝo estis sufiĉe bone preparita rilate tranoktadon, manĝadon, kaj transportadon de partoprenantoj. Laŭ mi, la organizantoj sukcesis trovi bonan kongresejon kaj disponigis sekuran kaj trankvilan tranoktejon en la sama konstruaĵo. Pro tiu aranĝo, kongresanoj povis facile partopreni programerojn kaj ĉiuj planoj povis realiĝi efike sen multa tempoperdo. Mi estas kontenta pri tiom da bonaj aferoj kaj tre ĝuis mian restadon en Aŭstralio. Mi povis senti la utilon de Esperanto kiel internacia lingvo, utiligi la lingvon por interparoli kaj diskuti pri diversaj aferoj, kaj starigi amikajn rilatojn.

Trie, mi vidas ke tiu kongreso povas ludi gravan rolon en la Oceania movado, ebligante la renkontiĝon inter aŭstraliaj kaj eksterlandaj esperantistoj kaj funkciante kiel diskoniga kaj organiza rimedo en la regiono. Ekzemple, ni diskutis la ideon realigi komunan kongreson inter tri landoj, nome Indonezio, Aŭstralio, kaj Nov-Zelando. La aŭstralia movado certe grave kontribuas por kuraĝigi kaj stimuli aliajn landojn en la regiono. Krome, la ekzisto de Esperanto en Aŭstralio montras kiel la internacia lingvo daŭre vivas kaj funkcias en lando de parolantoj de la angla lingvo.

Impresis min ke la komunumo ne estas tiom granda; tamen, ĝi estas sufiĉe solida kaj aktiva.

Laŭ mia opinio, la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) konstante klopodis por bona fluo de la kongreso. Ĝi certe stimulis la movadon kun nova energio per la partoprenigo de eksterlandaj samideanoj. Tio certe ebligis kunlaboron inter esperantistoj de la najbaraj landoj de la regiono kaj pli profundan diskutadon pri estonta kunagado. Sukceson al ni!



# Evildea Respondas

JOANNE JOHNS (MELBURNO)


Tre populara ĉe la esperantista junularo nuntempe estas la jutuba (YouTube) kanalo de "Evildea" - eble pli bone konata al kelkaj el ni kiel Richard Delamore. Liaj videoj estas foje instruaj, foje amuzaj, foje elkoraj, foje pensigaj, sed ĉiam distraj kaj interesaj. Mi demandis al li pri lia sukceso en ĉi tiu nova entrepreno.

## Kial vi starigis jutuban kanalon?

Mia jutuba konto starigis en 2011 kiam mi alŝutis unu filmeton al mia kanalo por partopreni hazardan konkurson. Tamen, la kanalo mem fondiĝis la 3-an de aprilo 2015. Tiutempe mi prizorgis blogon por aktoroj kaj ofte frekventis diversajn eventojn por alparoli kaj intervui ilin. Unutage, tre hazarde kaj lastmomente, mi decidis ĉeesti jutuban kunvenon ĉi tie en Sidnejo. Ĉe la kunveno, mi renkontiĝis kun kelkaj aliaj sampensaj tre viglaj junuloj, kiuj

prilaboras jutubajn kanalojn, precipe videoblogojn. Ili montris al mi kiel oni povas sin vivteni kaj karieron kreskigi per ĉi tiuj interesaj kaj amuzaj videoblogoj. Mi tre ŝatis la koncepton kaj decidis hazarde alŝuti plurajn videoblogojn al mia jutuba konto. Ĉiuj el ili estis en la angla lingvo sed unu filmeto rapide disvastiĝis kaj multege spektiĝis en Esperantujo. Tiu filmeto nomiĝis "Kio estas Esperanto?" kaj tagon poste dek aŭ dudek homoj ekabonis al mia konto. Tio impresis min kaj

Eltiraĵoj de la jutuba kanalo de Evildea



mi ŝanĝis mian konton al kanalo kaj daŭrigis alŝuti novajn filmetojn. Dum du semajnoj, mi daŭrigis alŝuti ĉiutagajn filmetojn al la kanalo por amuzi min, kaj ĉiutage pli kaj pli da homoj ekabonis. Tiam je la fino de la monato, mi rimarkis kreskon de pli ol 100 abonantoj! Evidentiĝis tiam ke la esperantistaro aprezis miajn kreaĵojn.

### **Ĉu vi povas iom priskribi la ĝeneralan enhavon de via kanalo?**

Mi alŝutas kvin specojn de filmoj, t.e. Esperanto-lecionojn, videoblogojn, videoludajn registraĵojn, intervjuojn kaj skeĉojn. La plejparto de la enhavo estas en Esperanto sed foje mi alŝutas anglajn filmojn. Mi ŝatas kovri multajn kaj diversajn temojn por ĉiam provizi miajn spektantojn per io nova kaj freŝa.

### **Kiom da abonantoj vi havas, kaj el kiom da landoj?**

Jam abonis iom pli ol 1.600 esperantistoj el 92 landoj. Pro la noveco de mia kanalo, abonantoj precipe venas de okcidentaj kaj angleparolantaj landoj. Usono (636), Brazilo (111), Britio (101), Aŭstralio (87), Francio (62), Germanio (59), Kanado (54), Hispanio (37), Nederlando (31), Meksiko (29), ktp. Tamen, lastatempe multe pli da esperantistoj el orienta eŭropo kaj Rusio ekabonis.

### **Ĉu vi surpriziĝas pro la sukceso de via kanalo? En via opinio, kio allogas homojn al via kanalo?**

Jes mi iel surpriziĝis pro la kreskrapideco de mia kanalo. Mi havas du supozojn pri kial mia

kanalo sukcesas. Unue, mi ĉiam kiel eble plej profesie prilaboradas mian kanalon. Mi ĉiam provas plibonigi la enhavon. Profesiaj kanaloj ĝenerale mankas en Esperantujo. Due, mi konstante alŝutas filmetojn al la kanalo seninterrompe. Oni povas fidi tion ke ĉiutage troviĝas nova filmeto ĉe mia kanalo. Oni povas facile alkitimiĝi al mia alŝuto-horaro. Krom tiuj du supozoj, mi supozas ke oni simple ŝatas min kaj tion kion mi faras.

### **Kiu estas via plej rigardata video?**

La plej spektataj filmoj kutimas esti la plej malnovaj. Tamen, la plej spektata anglalingva filmeto estas "How I became fluent in Esperanto". Oni jam spektis tiun filmeton pli ol 6 000 fojojn. La plej spektata Esperanto-filmeto estas "Intervjuo kun Chuck Smith de Duolingo". Oni spektis tiun filmeton pli ol 4 700 fojojn.

### **Kiel vi elektas la temojn de viaj videoj? Ĉu vi havas la ideon kaj tuj faras la videon aŭ ĉu estas multa laboro antaŭ ol vi registras?**

Tio dependas vere de multaj facetoj. Ekzemple, lecionoj ofte ĝermas el gramatikaj diskutoj kun komencantoj, videoblogoj de interesaj eventoj kaj kunvenoj, intervjuoj de gravaj movadaj novaĵoj, skeĉoj el hazardaj ideoj, kaj videoludaj registraĵoj de junula klaĉado. Mi ofte portas kajeron kun mi ĉar mi scias, ke la plej bonaj ideoj ĉiam ŝatas hazarde ekesti. Tamen, mi alŝutas filmeton ĉiutage, do evidente mi ne ĉiam havas ideojn. Tiutempe, mi ŝatas retumi tra la

popularaj Esperanto-retejoj por trovi ideojn, kelkfoje en la profundecon de la nokto.

**Ĉu vi havas temojn por videoj kiujn vi volas fari en la estonteco sed ĝis nun ne povis?**

Mi havas kelkajn grandiozajn ideojn kiujn iun tagon mi esperas efektiviĝi. Tamen, oni ofte forgesas kiom da tempo necesas por realigi eĉ la plej simplajn ideojn (tri horojn minimume). Ekzemple antaŭ kelkaj tagoj, mi faris skeĉon tri minutojn longan kaj necesis pli ol tago por munti ĝin. Iun tagon, mi volas fari horolongan filmon, do vi povas imagi kiom da la vivo mi perdus al tiu ideo.

**Ĉu vi multe bedaŭras la videojn en kiuj vi respondas al defioj kaj manĝas ne facile manĝeblajn manĝaĵojn? Kiu estis la plej malfacila video, kiun vi faris?**

Dufoje mi devis trasuferi stultajn defiojn proprajn; mi parte formanĝis bovlon da kapsikoj kaj tubon da vasabio. Ambaŭfoje mi vomis antaŭ la kamerao. Tiuj estis malfacilaj filmoj. Tamen evidentiĝis ke miaj spektantoj multe ĝuis tion, ĉar tiuj filmoj tuj populariĝis. Do, ĉu mi bedaŭras mian stultecon? Nu, dum la filmado mi certe dubas pri mia mensa sano, sed tuj poste, leginte la komentojn de miaj spektantoj mi ĉiam ĝojas vidi la entuziasman spiriton de nia virtuala komunumo. Mia kanalo fakte fariĝis pli ol videoejo sed eta Esperantujo por ĉiuj ĉie. Estas vere malfacile klarigi sen sperti ĝin.

**Kio plej surprizis vin pri viaj spektantoj?**

Ili sindonemo. Ili finance subtenas mian kanalon kaj eĉ sendas donacojn al mi de foraj landoj! Mi neniam antaŭe kredus, ke fremdulo aliflanke de la mondo spektus mian kanalon kaj tiam poŝtus donacon al mi!

**Ĉu via kanalo evoluiĝis kompare al kiam vi komenciĝis?**

Sendube jes! Kiam mi komenciĝis mi filmis ĉion per la ifono. Tamen, iompostiome mi aĉetis studian mikrofonaon, grafikan komputilon, profesion kameraon, lampojn, kaj eĉ verdan tabulon kaj ĉion el tiuj ekipaĵoj mi akiris per la financa subteno de miaj spektantoj. Due, mi jam filmis pli ol 250 filmoj do mi ja lernis multe pri profesia filmfarado.

**Kie homoj povas rigardi viajn videojn? Kiel homoj povas plu subteni vin?**

Oni povas spekti kaj sekvi miajn filmojn ĉe <https://www.youtube.com/evildela>. La plej bona maniero por subteni min estas per spektado kaj disvastigado de miaj filmetoj.



# Teatraĵo pri Esperanto-TV

KAM LEE (HOBARTO)

Ĉi tiu teatraĵo temas pri filmkompanio kiu faras filmdokumenton pri artgalerio kaj kelkaj el ĝiaj artaĵoj. EsperantoTV.net lastatempe konstruis aŭstralian retejon kiu havas elŝuteblajn filmojn, filmetojn, filmdokumentojn, kantajn prezentojn ktp. Nunaj diskutataj aferoj tre interesas min kaj, tial, mi decidis verki teatraĵeton kiu temas pri aspekto de Esperanto-TV.

La rolantoj de la teatraĵo estas:

- **Kam**, reĝisoro de Esperanto-TV (Kam Lee)

- **Edmund**, posedanto de la Muzeo de Esperaj kaj Senesperaj Artoj (Jonathan Cooper)

- **Ilia**, ĉefa komentariistino kaj komentariistino pri skulptaĵoj (Ilia Dewi el Indonezio)

- **Marushka**, komentariistino pri historio (Marushka Struminská el la Ĉeĥa Respubliko)

- **Nicole**, komentariistino pri pentraĵoj (Nicole Else)

- **Jacob**, fotisto (Jacob Sacher)

- **Teofilo**, trobadoro (Teofilo de Jesus el Orienta Timoro).

La teatraĵo komenciĝas ĉe la enirejo de la Muzeo de Esperaj kaj Senesperaj Artoj (MESA), ie en Eŭropo. La TV-kompanio vigle preparas ĉion por filmi la unuan parton de la filmdokumento. Samtempe Kam kaj Edmund amike konversacias pri la kunlabora projekto inter Esperanto-



Enkonduko de la teatraĵo: "Esperanto-TV: antaŭpordo al la estonteco, komunika ponto inter landoj, fenestro al mondaj eventoj kaj novaĵoj, necesa televida stacio por la mondkonscia homo, kaj rimedo de resumo de kritikaj taksoj de malsimplaj mondaj problemoj"

## TV kaj MESA.

Bone konata fakto estas ke kvar jarojn antaŭe okazis mistera malapero de filmgrupo de la mondkonata usona TV-kompanio CNN. La usona filmgrupo (dek homoj) malaperis dum ili filmis en la MESA-galerio.

Kam demandas al Edmund pri la nuna situacio de la mistero. Edmund malprecize respondas ke li ankoraŭ ne tutscias, kaj eble la grupo simple perdis sian entuziasmon daŭrigi la filmdokumenton kaj foriris. Malgraŭ manko de konvinka respondo al





Fotisto (Jacob) faras al la reĝisoro demandon senditan de la estro de Esperanto-TV, Richard Delamore, pri la nuna situacio de la filmdokumento. Bona progreso nuntempe okazas sed kiom longe ĝi daŭros?

la stranga situacio, la reĝisoro de Esperanto-TV decidas halti ĉi tiun konversacian esploron kaj daŭrigi la filmdokumenton.

Teofilo, la trobadoro, estas menciita de Edmund. La muzikisto ĉiuhore en la muzeo ludas ukulelon, samtempe kantas mallongan melodion, kaj poste anoncas la komencon de ĉiu nova horo.

Edmundo deziras ĉeesti dum la filmado, sed li tuj devas iri ĉar li devas

trafi aviadilon kaj taksi la progreson de sia sukcesa alt-teknologia fabriko de porteblaj komputiloj en Nov-Zelando.

La lumiloj, fotiloj, kaj mikrofonoj estas surloke. La filmistaro estas preta por filmi kaj jen la filmado komenciĝas. Dum la enkonduko, Marushka bonkore bonvenigas la aŭdantaron. Poste ŝi ekparolas pri la fascina historio de la muzeo,



Komentariistino pri historio (Marushka) prezentas eksterordinaran historion de la konstruado de la artgalerio kiu antaŭe estis antikva biblioteko.



Filmado komenciĝas. Marushka bonvenigas la aŭdantaron dum Jacob kontrolas la fotilon.

kiu unue estis prospera biblioteko de la ĉeĥa civilizacio konstruita antaŭ mil jaroj. “La granda ŝtona konstruaĵo estis entombigita pro vulkano kaj antaŭ nur sesdek jaroj ĝi estis retrovita”, diras Marushka en aŭtoritata nostalgia voĉo.



Trobadoro (Teofilo) distre informas la ĝeneralan publikon ke nun okazas la kvara horo, sed ĉu fakte alia afero ankaŭ okazas?

La kvara horo okazas. Aperas la trobadoro kiu feliĉe ludas ukulelon kaj kantas melodion. “La horo estas la kvara”, anoncas publike Teofilo en gajema sed impertinenta voĉo. Estas la unua fojo ke li estas videbla al la filmgrupo, kies anoj ĝojplene distriĝas. “Ĝis la revido”, li diris dum li kviete sed komike ŝteliris al ekster la ĉambro.

Poste io mistera okazas. Marushka subite malaperas. La reĝisoro opinias ke ŝi estas nur provizore okupita ie pri io kaj nepre ŝi baldaŭ revenos.

Post dudek minutoj, la takso de la situacio ŝanĝiĝas ĉar Marushka ankoraŭ ne revenis. La reĝisoro malvolonte decidas ke li nepre devas daŭrigi la filmdokumenton kaj, tial, ili provizore haltas la parton de la filmado pri la historio de la galerio.

La filmgrupo iras al la modernepoka pentraĵgalerio, grandega ĉambro kun alta plafono. Filmado pri la pentraĵoj ekkomenciĝas. Nicole staras apud la granda pentraĵo “Verdaj truoj kaj folioj en la gazono” pentrita de monde konata Jonathan Cooper en 2003. Nicole prezentas enkondukon pri la pentraĵo. “Klare rimarkeblaj estas la strangaj aranĝoj de la folioj kiuj respegulas la ĉefajn nunajn ideojn pri la universo,” emfazas Nicole dum ŝi movas siajn brakojn kaj manojn. “Unu el la kialoj por la okulfrapeco de la pentraĵo estas la ĉeesto de almenaŭ ducent verdo-nuancoj,” diras Nicole kun konvinka voĉtono. Per sia indikfingro, ŝi montras sur la impona abstrakta pentraĵo la strangajn truojn



Komentariistino pri pentraĵoj (Nicole) drome prelegas pri la moderna pentraĵo “Verdaj truoj kaj folioj en la gazono” de Jonathan Cooper, 2003.



Trobadoro (Teofilo) ĝentile anoncas ke nun estas la kvina horo. Ĉu nun estas la horo por malaperi de alia komentariisto? Verŝajne jes, ĉu ne?

kiuj similas al piedŝpuroj de bone konataj aŭstraliaj bestoj. Fine, ŝi faras komparon kun lia alia fama pentraĵo “Blanka truo en la freŝa neĝo je noktomezo” kiu esence estas abstraka pentraĵo pentrita de nigra kaj tre malhelgrizaj farboj.

La kvina horo okazas kaj la trabadoro akurate reaperas. Filmado paŭzas kaj la ĉambro estas plenumita de voĉa melodio akompanita de ukulelo. Teofilo prezentas kelkajn kapriolaĵojn kiuj distras la filmkompanion grupon.

“Jen estas la kvina kaj ĝis la venonta horo” anoncis la trobadoro, dum li denove ŝteliris al ekster la pordo. Filmado rekomenciĝas sed la reĝisoro rimarkas ke Nicole ne ĉeestas. Dek minutoj pasas kaj Kam konkludas ke ŝi ankaŭ malaperis. La reĝisoro devas decidi ĉu daŭrigi la filmadon aŭ ĉu serioze serĉi la du komentariistojn! Sciante ke la fintempo de filmado estas post nur du-tri tagoj, la reĝisoro decidas prokrasti ĉi tiun parton de la



Komentariistino pri skulptaĵoj (Ilia) emocie priskribas la skulptaĵon “Entuziasma Ruĝa Vitra Fagoto en Blua Metala Taso kun Kvar Kornoj” de Alida Leereveld, 1997. Poste ŝi rakontas intrigan anekdoton.

filmdokumento kaj registri la parton de la filmdokumento pri skulptaĵoj.

La filmgrupo eniras la galerion de modernaj skulptaĵoj kies fenestroj havas strangajn formojn kaj la muroj havas neregulan teksaĵon. La filmado de la skulptaĵa parto de la filmdokumento komenciĝas.

Ilia staras apud la pendanta skulptaĵo “Entuziasma Ruĝa Vitra Fagoto en Blua Metala Taso kun Kvar Kornoj” verkita de Alida Leereveld. Ŝi entuziasme enkondukas la skulptaĵon kiu aspektas simila al granda taso farita el miksaĵo de kupro kaj ŝtalo. “Ligitaj al la granda taso estas kvar kornoj kiuj ĉe ĉiuj finaĵoj havas moviĝantan fotilon kies bildoj estas montrataj sur ekrano ĉe apuda muro,” ŝi diras en konvinka esprimmaniero dum ŝi fingre montras la diversajn partojn de la skulptaĵo. Ilia rakontas pri la sekvanta interesa anekdoto. “Estas onidiro ke Alida estis inspirita pri la verko dum ekskurso en la sovaĝaj ebenaĵoj de


Afriko. Ŝi estis ĉirkaŭita de multaj atakemaj rinoceroj kaj kiel ŝi povas eskapi? Neantaŭvideble gvidanto arogante ludis fagoton kaj neatende la agresemaj bestoj malvolonte foriris.”

La sesa horo venas, filmado paŭzas, kaj nepre la trobadoro venas. Li drame diras per filozofa dirmaniero la sekvantan enigman mesaĝon: “Ni mirakle ligas kune, sed dividitaj de la sort’ Nekredeble la tempo rapide pasas, ĉu ne, kaj koincide post ses horoj, sur La Tero, Venuso, Marso, kaj Jupitero okazos meznokto, do jen la sesa horo! Ĝis mi renkontos vin aŭ eble ĝis vi renkontos min, ĉu ne?”

La trobadoro denove forpiediras

al alia ĉambro. La reĝisoro estas denove agrable distrita sed li estas maltrankvila pri la konsekvencoj. Ĉu la tria kaj lasta komentariistio malaperos? Kam demandas al la fotisto pri lia vidpunkto de la mesaĝo. Jacob ne respondis ĉar li ankaŭ malaperis! Fakte Kam estas la sola homo en la ĉambro kaj fakte la cetero de la filmteamo malaperis. Li turniĝis unu tutan ciklon kaj ĉie kie li rigardis ne estis spuro de iu. Kia koŝmara surprizo!

Pluvivinte la grandan ŝokon, li decidas ke ĉiu penso pri savi la filmdokumenton nun devas ĉesi kaj li serioze devas serĉi siajn kunlaborantojn. Piedirante tra la malplenaj koridoroj, li vokis laŭte



Eble por pensigi la aŭdantaron, la trobadoro (Teofilo) filozofe diras: “Nekredeble la tempo rapide pasas, ĉu ne, kaj koincide post ses horoj, sur La Tero, Venuso, Marso, kaj Jupitero okazos meznokto, do jen la sesa horo! Ĝis mi renkontos vin aŭ eble ĝis vi renkontos min, ĉu ne?” Ĉu li diras sian lastan anoncon?

la nomojn de la malaperintoj, sed nur respondis la eĥoj de lia voĉo. Duona horo pasis kaj oni povas vidi tra la fenestroj ke ekstere estas malhela nokto. Kelkfoje li eniras la vestiblon, piediras supren kaj malsupren laŭ la ŝtuparo al la multaj galerioj, sed ankoraŭ ne estas ŝpuro de iu.

Li proksimiĝis al malhela kela parto de la konstruaĵo kaj li aŭdis nedistingeblan brueton. Ju pli li piediras laŭ la kela koridoro, des pli laŭta kaj klara iĝas la sono. Signifan momenton! Li povas distingi ke la bruetoj estas emociaj petoj por helpo de kaptitaj homoj.

La enkarcerigoj troviĝas en kela provizejo kies dika metala pordo havas eksteran ŝlosilon kiu povas estis facile malŝlosita. Malfermite la pordon per iom da forto, la reĝisoro renkontis la ĉagrenitajn homojn kiuj estas ĉiuj el la filmistaro. Ili estis kaptitaj en la granda forlasita staplo.

Li demandis al la komentariistoj kiel ili eniris ĉi tiun staplon, kaj kio okazis dum ili malaperis. Ili respondis ke ili memoras la aperon de la trobadoro sed tuj poste ili sentis sin tre dormemaj kaj eniris staton de senkonscio. Poste, ili vekiĝis kaj trovis ke ili estas en ĉi tiu ĉambro kiu aspektas kiel parto de forlasita staplo.

Restas multaj neresponditaj demandoj, sed la pluvivo nuntempe estas la ĉefa prioritato, ĉu ne? Sciante la vojon al la enirejo, Kam gvidis la grupon laŭ la kela koridoro kaj supren laŭ la ŝtuparo al la tera etaĝo. Kviete kaj memfide, ili atenteme piediras laŭ la kvieta malplena koridoro al vestiblo kaj foriras el la muzeo.

Multaj demandoj restas neresponditaj, sed almenaŭ unu sukcesa eskapo kaj espereble bona okazo por savi kaj fini la filmdokumenton!





# Esperantaj poŝtkartoj

PETER WILLIAMSON (MELBURNO)

---



Kenneth kaj Sofia Simmons

Miaj prageavoj, Kenneth kaj Sofia Simmons, estis esperantistoj en Tasmanio. Inter 1907 kaj 1932 ili ricevis proksimume 720 poŝtkartojn, inkluzive de 650 en Esperanto el 44 landoj. Bedaŭrinde, kiam mia patrino estis knabino ŝi volis havi poŝtmarkan kolekton kaj forprenis la poŝtmarkojn el la kartoj. Pli poste ŝi provis ripari ilin. Tial, nun multaj el la poŝtmarkoj ne akordas kun la ĝustaj kartoj.

Multaj el la korespondoj estas mallongaj, banalaj, aŭ havas ne kompreneblan skribon, sed kelkaj permesas iom da kompreno pri la

vivo de la verkistoj.

Miaj plej ŝatataj kartoj enhavas almenaŭ unu foton de la homo kiu skribis sur la dorsoflanko. Ekzemplo estas la rusa ortodoksa pastro, Innokentij Seriŝev, kies teritorio kovris okcidente de Kurgan al oriente de Zakrasnayo, Siberio (norde de Kazaĥio al norde de Ĉinio). En unua poŝtkarto li priskribis sin tiel: “Mi estas ruso, grekortodoksa (rusa ortodoksa) pastro, progresemlulo, 28-jaraĝa, dum 10 jaroj edziĝinta, sen infana, nefumanto”. En la venonta karto li aldonis “klerika, socialista revoluciulo”. Plua interreta esploro montras ke li iĝis esperantisto en 1910 kaj estis orientalistoj, kontraŭ la caro kaj kontraŭ la deziro de la rusa ortodoksa eklezio ke homoj restu malspritaj. Kvankam Seriŝev ne estis eklezie senfrokigita, li senfrokigis kaj iĝis evangeliisto, ne por Dio, sed por Esperanto kaj ĝia unuiganta celo. En 1913 lia Esperanta libro “Siberio” estis eldonita.

Seriŝev konsideris sin vera instruisto kaj uzis poŝtkartojn por disvastigi Esperanton tra la mondo. Post la rusa revolucio li iris al Japanio por skribi por Esperanta revuo kaj estis senmovigita en la vortico de milito. Seriŝev poste iĝis fama pro la alportado de Esperanto al Japanio, Koreo, kaj Ĉinio. En Japanio li skribis Esperantan-japanan vortaron. En



Ĉinio li instruis en Esperanta lernejo.

La kartoj, kiujn miaj prageavoj ricevis de Pastro Seriŝev estis de 1912 ĝis 1914. Kelkaj el liaj poŝtkartoj montras severajn statojn kiel profunda vojo tra lavango kaj primitivaj nomadoj el Kirgizio, Transbajkalo, kaj Tunguzko. Seriŝev nombrigis ĉiun el

siaj proksimume 11 300 poŝtkartoj al aliaj homoj (dum tri jaroj). Li sendis deksep al miaj prageavoj.



Trafosado de profunda lavango



Lamaista preĝejo



## Pastro Innokentij Serišev kaj fratino





Siberia nomado



Kial tiom da nov-zelandanoj amasiĝis antaŭ la Parlamentejo?  
Pro la fakto ke Nov-Zelando denove gajnis (kontraŭ Aŭstralio) la tutmondan rugbean  
ĉampionecon!



## **New Zealand Esperanto Association**

P.O. Box 8140  
Symonds Street  
Auckland 1035  
New Zealand

**[www.esperanto.org.nz](http://www.esperanto.org.nz)**  
[nzea@esperanto.org.nz](mailto:nzea@esperanto.org.nz)  
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, Rouan  
van Ryn, David Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



## **Australian Esperanto Association**

Esperanto House  
143 Lawson Street  
Redfern NSW 2016  
Australia

**[www.esperanto.org.au](http://www.esperanto.org.au)**  
[info@esperanto.org.au](mailto:info@esperanto.org.au)  
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary


Committee Members:

Margaret Chaldecott, Joanne Johns,  
Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.





**TRILANDA KONGRESO  
DE ESPERANTO KAJ  
SOMERKURSARO**

# **BANDUNG, INDONEZIO**

23-28 MARTO 2016



AŬSTRALIA ESPERANTO-ASOCIO  
INDONEZIA ESPERANTO-ASOCIO  
NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIO

Vizitu [aea.esperanto.org.au](http://aea.esperanto.org.au)  
por pli da informo

